

KIAL MI IĜIS KATOLIKO

Respondo al unu (evangeliana) kulpigo – kial?

Mi naskiĝis en profunde kredanta evangeliana reformacia familio, kiu vivis tuttute el „sola scriptura“ (nura Skribo). Mia patro konis ĝis sia morto en la aĝo de 91 jaroj parkere kelkajn partojn el la leteroj de s-ta Paŭlo kaj la psalmoj. Ĉiusemajne kiel infanoj ni vizitadis dimanĉan lernejon, kie nin instruis „onkloj“ Ruth, Marie kaj Hanna. Tio kune kun eduko en la familio metis firmajn fundamentojn de mia kredo. Precipe en la viva memoro mi havas iujn historietojn de la „onklo“ Ruth, kiu brilis per entuziasmo, kiam ŝi rakontadis pri Jesuo. Fervore kaj ŝate mi legis grandan malnovan Biblion tradukitan fare de Luther. Mia naskiĝdomo kaj la dimanĉa lernejo vekis mian amon al la Sankta Skribo, kiu estis dekomence kaj ankaŭ restis mia la plej grava libro. En dekdua jaraĝo mi foriris en iun evangelianan internulejon en suda Germanio, kie mi estis sekse misuzita kaj seksperfortita. Mia vivo ĉi tie en la komenco de pubereco suferis gravan neripareblan damaĝon. Neniam mi pro tio kulpigis la evangelianan landan eklezion, sed ĉiam nur la koncernajn krimfarintojn.

Post du jaroj min la gepatroj loĝigis en alia evangeliana internulejo en Münsterland, kie la infanoj trovadis varman hejmon kaj respondecajn afablajn edukistojn.

Kiam miaj malfacilaĵoj el la antaŭa internulejo atingis supron, sendis min la gepatroj por refortiĝo al parencoj en Höchenschwand. Ĉi tie mi la unuan fojon eniris sola en la katolikan preĝejon. Kun la patro, kiu estis arkitekto kaj konstrua entreprenisto, kiel infanoj ni vizitadis malnovajn famajn germanajn preĝejojn kaj la patro al ni prezentadis artobjektojn de la okcidenta kulturo.

En Höchenschwand mi la unuan fojon iom timeme kaj heziteme eniris sola en simplan barokstilan kamparan preĝejon, kiu enskribiĝis en mian memoron. Ne brulis ĉi tie kandeloj kaj nek bonodoris incensaĵo kiel

en Milano. Sed subite – apenaŭ mi kapablas tion priskribi – min surprize atakis tute firma certeco: Ĉi tie restadas Dio. Li estas ĉi tie ĉeestanta. Tiun ĉi certecon mi en la evangeliana preĝejo neniam havis. Nekuraĝe mi iris antaŭen, en la jaro 1955 ĉi tie estis ankoraŭ altaro kun tabernaklo meze, kaj mi sidiĝis sur la benkon. Lumis tie nur du ruĝaj lampetoj.

De antaŭe min surverŝis ondo de la varmo, sekuro kaj nepriskribebbla konsolo. Neniam mi havis la kuraĝon pri tio paroli, ĉar tio estis io neesprimebla, nepriskribebbla, tre interna stato. Unuan fojon ekregis en mia vundita dekkvin jaraĝa animo profunda paco. Ekde tiu tempo mi serĉis konsolon kaj kvieton ĉiam en la katolika preĝejo. Kelkajn jarojn pli poste mi en la evangeliana gimnazio aŭdis en leciono de la religio, kiel la instruisto kun granda respekto parolis pri la Plejsankta Sakramento kaj diris, ke la katolikoj kredas, ke la sacerdoto en Vespermanĝo de la Sinjoro reale transformigas la panon je Korpo de Kristo kaj tion oni poste ricelas kaj adoras en la tabernaklo.

Kaj jen mi eksciis, kiu min en la kamparana preĝejo tiel konsolis. Mi sciis, ke mi ne devas nur nun iĝi katoliko, ĉar mi jam la katoliko estas. Kristo ĉeestanta en la tabernaklo min mem al tio alvokis.

Post antaŭtempa morto de mia patrino en la jaro 1963 mi pli longan tempon restadis en Romo. Mi vizitis germanan nacian preĝejon Santa Maria dell' Anima kaj tie mi la unuan fojon renkontiĝis kun la katolika sacerdoto, tiam juna kurato D-ro Westhoff (pli posta urba dekanato en Kolonjo). Mi konfidis al li deziron konvertiĝi. Mi rakontis al li mian travivaĵon en Höchenschwand, li komprenis min kaj faris bezonatajn paŝojn. Tio estis en la tempo de la koncilio kaj mi en Romo travivis aferojn, kiujn mi ne povas ĉi tie rakonti. Escepta honorigo por mi estis

renkontiĝo kun la papo Paŭlo la Sesa, kies profunda spiritualeco min tre impresis.

Tiam mi studis en Kolonjo proksime de mia naskiĝurbo Wuppertal. D-ro Westhoff min rekomendis al paroĥestro ĉe Sankta Alban en Stadtgarten, D-ro Hugo Poth, vera sacerdoto laŭ bildo de Melkicedek. Li estis la unua el la tuta vico da katolikaj pastroj, kiun por renkonto kun mi sendis la Sinjoro.

Ne la analizo ĉe eminenta eŭropa psikanalisto estis la kuracilo por traŭmato de la 12 jaraĝa knabo. Estis tio konsekritaj sacerdotoj de la katolika eklezio, kiuj al mi per sia plenpovo, de Kristo komisiitaj en la sakramento de la pentofaro, kaj per ekspliko de la Dia Vorto perigis benon kaj resaniĝon.

Eĉ ne sukcesinta analizo de la eminenta kuracisto povis al mi perigi tion, kion povis doni al mi la Eklezio per sia apostola plenpovo, nome diferencigon de miaj pekoj de tiuj de aliuloj, kaj per tio malligi nodon kaj pacigi miajn pekojn per la sakramenta absolvo. La pastroj tiel daŭrigis tion, kio komencis en Höchenschwand, kaj alkondukis min al tio, ke mi akiris plenan pardonon kaj antaŭ ĉio liberigon.

Mi estis baptita en Regno fare de iu „germana kristano“. Ĉar mi ne havis certecon, ĉu li uzis la ĝustan baptoformulon, ordonis kardinalo Fring novan subkondiĉan bapton. Tiun ĉi grandegan gracon mi ricevis en la aĝo de 24 jaroj malfrue antaŭtagmeze en belega preĝejo de sankta Alban en Kolonjo. La preĝejservisto estis mia baptopatro.

La unan sanktan komunio mi akceptis ankoraŭ antaŭ la oficiala akcepto en la katolikan Eklezion en malgranda vilaĝa preĝejo fare de iu franciskano. Simple mi ne povis tion elteni. Kion mi travivis sur genubenko post la sankta komunio, tion oni ne povas priskribi. Sed ĉiam aperas en mia kapo la vortoj de Patro Pio: „Zorgu, ke via lasta sankta komunio estu tiel same pura kiel la unua.“

Mi travivis, kiaj mondoj kuŝas inter la protestanta vespermanĝo kaj la sankta

komunio.

Mi ne katolikiĝis pro tio, ke tio estis la evangeliana internulejo, kie mi estis seksmisuzita, aŭ ke ne konvenis por mi situacio en la eklezio. Mi iĝis katoliko, ĉar Kristo revelaciis sin al mi en Eŭkaristio kaj mi trovis tion, pri kio mi ĉiam sopiris.

Kaj mi iĝis katoliko, ĉar tiu Eklezio spite de ĉiuj homaj malfortecoj konservadas fidele de Kristo fonditan apostolecan sekvantecon kaj havas en sia anstataŭanto sur la mondo sian paŝtiston. Luther kaj reformatoroj nuligis apostolecan sekvantecon kaj lasis parton de grego de Kristo sen la paŝtisto. Kaj la protestanta grego sin disfaliĝis je miloj da denominacioj, kiuj inter si eĉ ne estas unuecaj.

Sian protestantan heredaĵon, la amon al la Sankta Skribo, denkeme mi konservas ĝis la morto.

Mi konservas ankaŭ la amon al ĉiuj veraj kristanoj.

Sed neniam estos por mi ebla, por ke mi forlasu la sakramentan plenecon kaj revenu tien, kie nur estas kovrata la sakramenta malpleno.

Mi eĉ ne povas eliĝi el la sankta katolika Eklezio pro interna aŭ ekstera premoj, ĉar mi ne povas eliĝi el mi mem.

Mi estas en tiu ĉi domo de la Eklezio el vivaj ŝtonoj unu ŝtono, malgraŭ tio, ke ĝi eriĝas kaj bezonas la sakramentan martelon.

Eĉ se la homoj en tiu ĉi Eklezio pekis kaj plu pekas, ankaŭ mi kiel pekema homo konsciiĝas, ke Li, ĝia Kapo, faras el la Eklezio de la pekuloj ĉiutage la Eklezion de la sanktuloj kaj armigas ilin per la saktamentoj, por ke ili rezistu princon de tiu ĉi mondo kiel lasta bastiono.

Tiu ĉi konscio min plenigas per granda ĝojo kaj paco.

Dankon al la Sinjoro, kiu min el sia graco alvokis en sian Eklezion. Neniam mi volas ĝin forlasi! ■

*Michael Schneider-Flagmeyer
Der Fels 12/2011*